Heinrich Heine,

# Alvenas generacioj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Alvenas generacioj
Kaj ree iras for;
Sed ne formortas la amo
estanta en mia kor'.

Nur unufoje, mortonte,
Mi emus revidi cin
Kaj diri al ci surgenue:
"Mi amas vin, sinjorin'!" [2]

*Traduko de la Germana poemo "Die Jahre kommen und gehen" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-510-1003 (2010-02-11 11:57:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, uzis en mia Esperantigo la pronomojn "ci" ka "vin" por redoni tion, ke la poeto uzis en la lasta linio la germanan prepozion "Sie", per kiu oni alparolas fremdajn personojn. Sonas tio iom ironie aŭ moke. La poeto faris tion verŝajne intence por distancigi sin iom, kvazaŭ ŝerce.*

Heinrich Heine,

# Venas la jaroj kaj foriras

*tradukita de Corrado Grazzini*

Venas la jaroj kaj foriras
kaj tutaj generacio pasas kun ili;
sed la amo, la amo el mia kor'
ne malaperas.

Unufoje mi volus vidi vin ankoraŭ,
mi volus fali surgenue ĉe vi,
kaj volus diri mi, mortanta, al vi:
vin amas mi, virino!

*Traduko de la Germana poemo "Die Jahre kommen und gehen" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Corrado Grazzini.*

*Arg-510-1002 (2010-02-07 01:28:19)*

*Tiu ĉi traduko estas laŭvorta Esperantigo, ne rimita kaj ne havanta la versritmon de la germana-lingva originalo (Manfred Retzlaff). Ĝi aperis en la n-ro 1/1967, de la 16-a de Januaro 1967, en la Esperanta revuo "Heroldo" (laŭ indiko de s-ro Lars Kromann, Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danujo,* `lars.kromann@mail.dk`*).*

[2] aŭ eble:
"Madame, mi amas vin!";
ĉar ankaŭ en la germana-lingva originalo troviĝas la franca vorto "Madame".